

El fervoja mondo 12/2014

Britio:

Altlernejo por grandrapida fervojo estos en *Birmingham*

Ŝtata teknika altlernejo por grandrapida fervojo havos unan sidejon en *Birmingham*, kaj duan en *Doncaster*. Tiu ĉi institucio estos laŭplane malfermita en jaro 2017, kun celo garantii fakan instruadon en speciala fako, destinita precipe por prepari inĝenierojn laborantajn por projekto de grandrapida fervojo 2 – *High Speed 2*. Laŭ registaro la projekto *HS2* kreas ĉirkaŭ 2000 postenojn por disĉiploj, kaj dum konstruado ĝi donos laboron al ĉirkaŭ 25 mil laborantoj. Ĉi tiuj du urboj estis elektitaj baze de publika oferto, kiu pritaksis ĉiujn kriteriojn inkluzive de grandeco kaj konvena lokado, ĝiaj alireblo kaj potencoj por disvolvi fortan kunligon kun laboronantoj kaj ekspluatantoj, en tiu ĉi sektoro jam laborantaj.

Ĉeĥio:

Nacia tago de fervojo en fervojnodo *Břeclav*

Sabaton, la 27-an de septembro 2014 en apudlandlima fervojnodo *Břeclav* okazis tutŝtata solenaĵo okaze de Nacia tago de la fervojo, kiu krom tradicia festotago de fervojistoj memorigis ankaŭ pri 175-a datreveno ekde komenco de fervoja trafiko sur unua vaportrakcia fervojlinio sur teritorio de nuna Ĉeĥa respubliko, parto de iama Norda Fervojo de la Imperiestro Ferdinando el Vieno al *Břeclav*, kiu okazis la 6-an de junio 1839.

La solenaĵo, organizita de Ĉeĥaj Fervojoj (ČD) kun subtitolo „De vaporo ĝis *Railjet*“ prezentis al vizitantoj historian kaj nuntempan flankojn de ĉeĥaj fervojoj.

Kiel historia parto estis prezentataj veturiloj en lokomotivdeponejo inkluzive sur turnoplato, kaj kelkaj specialaj pasaĝer- kaj vartrajnoj, kiuj prezentcele veturis al diversaj direktoj en fervojnodo *Břeclav*. Miloj da vizitantoj do inter ekspoziciataj historiaj veturiloj povis admiri ekz. elektran lokomotivon E 499.047 el Slovakio, elektran lokomotivon de origina serio E 94 DR, nun 1020.37 ÖBB el Aŭstrio, aŭ lokomotivon de ČD Cargo – S 489 0001 (230 001). El vaporlokomotivoj estis videblaj ekz. 314.303, 475.101 kaj 475.179 ČSD, 01 1533 DR, 01 12 – 7 PKP aŭ „ĝibulo“ 310.23 ÖBB.



Pluaj lokomotivoj de vapora kaj termikmotora traktioj funkciis trenantaj menciitajn specialajn nostalgiajn trajnojn. Pasaĝertrajnojn ekzemple gvidis vaporaj lokomotivoj 556.036, 534.0432, 477.043 kaj aŭstra 78.618, dizellokomotivoj T 478.1008 kaj 1010, historiaj motorvagonoj M274.004 kaj M262.0018, kaj kelkaj aliaj. Flanke de vartrafiko estis videbla plej interesa paro de „fototrajnoj“ trafikanta el *Břeclav* al *Hrušovany nad Jevišovkou* kaj reen, kaj trenata de du dizellokomotivoj „Sergej“ T 679.1600 kaj T 679.1168.

El nuntempo estis prezentataj veturiloj de serio *Regio* por regiona trafiko, de ČD – *Pendolino* kaj de plej nova *Railjet* por longdistanca trafiko. Por miloj da vizitantoj krome estis preparita vico da akompanaj aranĝoj, ekz. konkurso en gvidado de permana drezino aŭ ekspozicio pri sekurprova trajno.

Ĉeĥio:

Fotoekspozicio *FISAIC* prezentata en hospitalo en *Příbram*

Ekde 7-a de oktobro 2014 en *Galerio gaudii gratia* en regiona hospitalo en urbo *Příbram* estas publike prezentata ekspozicio kun nomo „Renkonto en tempo kaj spaco II“. Ĝis fino de decembro 2014 ĉi tie estas ekspoziciataj fotografajoj – verkoj de membroj de grupo Foto ĉe landa asocio *FISAIC* ČD, inter tiuj de *Jan Týc*, *Jarmila Šmerhová* (membro de Ĉeĥa l.a. de IFEF), *Tomáš Kazil*, *František Pecho*, *Ivan Gavenda*, *Jiřina Marášková* kaj *Jaroslav Škalda*. Sur dekoj da fotografajoj estas prezentataj motivoj el fervoja agadkampo – trajnoj, stacioj ktp. Informojn vi povas trovi sur retpaĝo <http://fisaic-foto.cz/>.

Ĉinio:

Du grandaj urboj en Tibeto estas kunligitaj per fervojo

Ekde unua duono de aŭgusto 2014 okazas trafiko sur 253 km longa fervoja linio inter tibeta ĉefurbo *Lasao* kaj la dua plej granda urbo *Xigaze* en okcidento de tiu montara regiono. Nova fervoja linio reduktis veturtempon inter ambaŭ urboj de 4 horoj ĉe trafiko sur ŝoseo al ĉirkaŭ 2 horoj ĉe trajntrafiko. Konstruado de fervojlinio komenciĝis en septembro 2010 kun planita investo 13,3 miliardoj da juanoj (ĉirkaŭ 1,7 miliardoj da eŭroj). La unutraĉa fervojlinio estas projektita por maksimuma rapido 120 km/h konsidere de malfacila tereno, kiu postulis konstrui 29 tunelojn kaj 116 pontojn en totala longo atinganta ĉirkaŭ duonon de la fervojlinio. Krome estas

trairata granda, 60 km longa kanjono *Yarlung Zangbo*, kie geologiaj kondiĉoj entenas varmakvajn fontojn. Traceado de fervojlinio ankaŭ devis plenumi postulon eviti fontojn de trinkakvo kaj naturrezervejojn.

Francio: **Komputila sistemo ŝirmas kablojn antaŭ ŝtelistoj de metaloj**

Grupo de fervojentrepreno *SNCF* informis pri uzado de nova kompleksa sistemo, evoluita de kompanio *WiN MS*, kiu servas por ŝirmi infrastrukturon kontraŭ ŝtelistoj de metaloj. Laŭ statistikaj donitaĵoj pri jaro 2011 sur francaj fervojoj okazis ĉirkaŭ po ok ŝteloj de kabloj tage. Tiuj ĉi ŝteloj por *SNCF* prezentis aldonajn elspezojn entute 30 milionoj da eŭroj. Nove instalita monitora sistemo estas rekte kunligita kun polica informa sistemo, kio laŭ *SNCF* ebligis solvi pli multajn okazojn de ŝtelado kaj samtempe kapti kaj kulpigi ŝtelistojn. La kompanio emfazis, ke instalado de nova sistemo ne postulas ĉesigon de trajntrafiko.

Germanio: **Regula vartrajno el *Hamburg* ĝis *Zhengzhou***

Trafikisto *DB Schenker* interkonsente kun havenoficejo en *Zhengzhou* komencis en septembro 2014 trafikon de unua vartrajno el *Hamburg* al tiu ĉi ĉina urbo, kiu tiel kompletigas la jam ekde aŭgusto 2013 okazantan trajnkurson unufoje en semajno el *Zhengzhou* al *Hamburg*. La vartrajno transportas diversajn varojn, ekzemple ekonomiajn robotojn en 41 konteneroj. Trajnveturo laŭ horarplano daŭras ĉirkaŭ 17 tagojn, kaj transiras distancon 10 214 km tra Pollando, Belorusio, Rusio kaj Kazahio, kaj tio estas je 20 tagoj malpli ol trafiko surmara. *DB Schenker* bloktrajnojn ĝiscelajn inter Ĉinio kaj Germanio ekspluatas unufoje semajne ekde jaro 2011, kaj transportis jam 40 mil *TEU* en jaroj 2012 – 2014. Pli multaj klientoj apartenas al aŭtomobila kaj elektroteknika industrioj.

Germanio: **Novaj veturilkombinaĵoj por diagnoziko de fervojlinio ŝparas tempon**

Grupo de fervojentrepreno *Deutsche Bahn* 24-an de septembro 2014, dum berlina trafika foiro *InnoTrans*, prezentis novajn veturilkombinaĵojn por diagnoziko de fervojlinioj. La aranĝaĵo estas destinita por mezuri deviojn de postulata trakogeometrio, kaj tio ĝis ekspluatrapido 140 km/h. Uzo de la menciata aranĝaĵo signifas (kompare kun uzado de jam ekzistantaj ekipaĵoj de tiu ĉi tipo) por fervojo signifan tempoŝparon. Livero estas parto de vasta modernigo de ekipaĵo por diagnoziko de trakoj, kiujn la grupo de *Deutsche Bahn* anoncis en jaro 2012. Totalaj elspezoj por realigo de tiu ĉi plano estas taksataj je 30 milionoj da eŭroj. Plimulton da liveroj plenumas aŭstra produktanto *Plasser & Theurer*.

Japanio: **Ekzamencentro *Mihara* komencis testi veturilojn**

Entrepreno *Mitsubishi Heavy Industries* malfermis provlaborejon, kiu estas unua japana aranĝaĵo funkcia kiel vasta fervojtrafika sistemo. La centro troviĝas en entrepreno *Wadaoki* en Hiroŝimo. Aliro estas ebla por al ĉiuj privataj kaj publikaj organizoj en kadro de ŝtata strategio rilate disvolvo de eksporto de japana fervoja teknologio. La centro estas ekipita per 3,2 km longa linimaŝo kun du ŝpuraj – 1435 mm kaj 1 067 mm, por veturiloj trafikantaj per rapido ĝis 100 km/h, kaj ebligas testi ankaŭ veturilojn por ŝpuro 1000 mm. Eblas tie ĉi testi bruon kaj vibradon, sekurecajn aranĝaĵojn, movan ekipaĵon, regadajn kaj komunikadajn sistemojn.

Kazahio: **Ŝtatprezidento parolis dum inaŭguro de novaj fervojlinioj**

Prezidento *Nursultan Nazarbajev* la 22-an de aŭgusto 2014 donis signalon por samtempa inaŭguro de trafiko sur fervojlinioj en direktoj oriento-okcidento kaj nordo-sudo, en totala longo 1200 km. Per telekonferenco la prezidento parolis al personalo en stacioj laŭlonge de fervojlinioj el stacio *Zhezkazgan* kaj diris, ke malfermo de ĉi tiuj du linioj en la sama tago okazas en Kazahio unuan fojon, kaj ke tuta lando profitos je redukto de transiraj tempoj en vartrafiko inter Azio kaj Eŭropo. Fervojlinio 988 km longa trairas maldense enloĝigatajn stepojn, dezerton kaj salajn marĉaĵojn, kaj sekvas ĉirkaŭ 1000 km longan parton de orient-okcidenta linio inter ĉina landlimo kaj haveno *Aktau* apud Kaspia Maro. El *Aktau* iras kunligo al fervoja linio al Turkmenio, de kie iras koridoro al Irano. Tiu ĉi estas jam antaŭ finkonstruo.

Usono: **Florido ricevos modernajn pasaĝervagonojn kaj lokomotivojn**

Privata organizanto de pasaĝertrafiko *All Aboard Florida (AAF)* elektis firmaon *Siemens* por liveri veturilojn por proponata interurba trafiko sur linio *Miami – Orlando*, kiu uzas fervojan linion sur orienta marbordo de Florido. *Siemens* liveros dizelelektrajn lokomotivojn *Charger*, kiuj atingas rapidon 200 km/h, kaj basplankajn pasaĝervagonojn por interurba trafiko. Tiuj ĉi vagonoj estas muntataj en *Sacramento* kun uzo de komponantoj fabrikataj en diversaj lokoj en Usono. *AAF* planas komenci ekspluatadon per kvin trajnkompletoj; ĉiu

trajnkompleto konsistos el po du dizelektraj lokomotivoj kaj kvar pasaĝervagonoj. Trajnoj estos ekspluatataj inter fervojaj stacioj *Miami*, *Fort Lauderdale* kaj *West Palm Beach*, kie oni atendas inaugŭron de trafikado en jaro 2016.

Laŭ *Železničář* kaj *Cargovák* preparis *Jindřich Tomášek*,
reviziis *Heinz Hoffmann*